

# esperanto aktuala

Revo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 2 / 2012



## Saluton Kara Legantaro !

Ni varme dankas vin pro viaj instigoj kaj ankaŭ pro viaj multnombraj mesaĝoj ĉe [aktuala@esperantobruselo.org](mailto:aktuala@esperantobruselo.org) .

Ni dankas ankaŭ Marek Blahuš (kovrilo-bilde), kiu helpis nin dum la lastaj monatoj por prepari diversajn aferojn (Zam'Feston, reklamojn, kunvenojn, ...). Ni deziras al li bonan reinstaliĝon en Ĉeĥio kaj esperas revidi lin baldaŭ en Bruselo.

Pli kaj pli da Esperantistoj ŝajnas interesiĝi pri ekonomio (kaj ĉefe sociala katastrofo !). La grandaj disfalaj signoj ne mankas ...

Tiujare, ni daŭrigas publikigi Aktuala-on ĉiun dumonaton. Tiu elsenda ritmo pli konvenas al ni kaj ankaŭ al niaj kunlaborantoj (kiuj zorgas pri presado, etikedoj, poŝto, ktp ...).

Ne forgesinda : Ni invitas vin ĉiujn por bonvenigi la UEA prezidanton **Probal Dasgupta**, la 2an de Majo. Ne maltrafuu tiun eventon ĉe EBG !



La agendo pleniĝas por la venontaj semajnoj. Ne hesitu regule kontroli surrete : [http://www.esperantobruselo.org/drupal0/Eo-Kafejo, BeKo, Bruĝa Festo, ktp ...](http://www.esperantobruselo.org/drupal0/Eo-Kafejo,BeKo,BruĝaFesto,ktp...)

**Ni esperas renkonti vin ĉiujn !!!**

*Samy kaj lia Paĉjo*



Probal Dasgupta

## Enhavo :

Paĝo 3	Eventoj
Paĝoj 4-6	La Kanto de la Maizo
Paĝoj 7-10	Debato : 4 vizioj
Paĝoj 11-12	Familiaj Ĝardenoj
Paĝoj 13-14	MES en Issambles
Paĝoj 15	Eventaj fotoj





36a ELDONJARO.

Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la N° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro : Laurent kaj Samy Loisse [aktuala@esperantobruselo.org](mailto:aktuala@esperantobruselo.org) ; Prezidanto : Angelos Tsirimokos ; [prezidanto@esperantobruselo.org](mailto:prezidanto@esperantobruselo.org) ; Kasisto : Jan Amadori [jan.amadori@gmail.com](mailto:jan.amadori@gmail.com)

sekretario : Laurent Loisse : [sekretario@esperantobruselo.org](mailto:sekretario@esperantobruselo.org)

Abona membriĝo : 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 ;

Kunvenloko : rue van Maerlant, N°2 - ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Metroo Maelbeek (tie nek poŝtkesto nek telefono)

Informoj : [www.esperantobruselo.org](http://www.esperantobruselo.org)

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre speculas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela



## Agendo

### Aprilo 2012

<b>Merkredo la 18a</b>	Semajna kunveno
<b>Sabato la 21a</b>	Eo-Kafejo en Bruselo (Brasserie SiSiSi)
<b>Dimanĉo la 22a</b>	Trilanda Renkontiĝo en Tongeren
<b>Merkredo la 25a</b>	Semajna kunveno + Ludoj
<b>Vendredo la 27a</b>	BeKo : BEneluxa KOngreso en Wépion (ĝis Mardo la 1an de Majo)

### Majo 2012

<b>Merkredo la 2a</b>	Vizito de Probal DASGUPTA (Prezidanto UEA)
<b>Sabato la 5a</b>	Serĉpromenado en Gento
<b>Merkredo la 9a</b>	<b>!!! Eŭropa Tago !!! Ne kunveno !!!</b>
<b>Sabato la 12a</b>	- Bruĝa Festo kun JoMo - 5a KuPro (KUrso por PROgresantoj)
<b>Merkredo la 16a</b>	Semajna kunveno
<b>Merkredo la 23a</b>	Alex Humet prelegos pri Japanio
<b>Merkredo la 30a</b>	Semajna kunveno

## La Kanto de la Maizo

Ĉe la Hopi-Indianoj, popolo vivanta en la aridaj Arizona kaj Nov-Meksika regionoj (hopi ilialingve signifas pacema), mitologia persono kun nomo Kokopelli asociiĝas kun fekundeco kaj ĝermado. La aliaj indianaj popoloj konas lin, kiel la "ĝiba flutludanto H. Lia senkompara silueto estas priskribita, laŭjlue de la jarcentoj, sur multaj ŝtonoj kaj potejoj de la du Amerikoj. Laŭ ili, lia ĝibo estas sako de semoj, kiujn li disjetas ĉiufanken. La kapo de Kokopelli estas kovrita per kosmaj antenoj, kiuj ebligas ĝin kapti la kanton de la steloj por enblovigi ĝin al la Vivoplenaj Semoj, Steloplenaj Semoj kiuj fekundas la Tero-Patrinon. Koncerne lian jlu-ton, ĝi estas la fonto de la enblovigita spirito en ĉiun el la grajnoj.



Fronte al la detruaj fortoj, kiuj nuntempe senbridiĝas sur la planedo, la simbolo Kokopelli reprezentas por ni la esperon de Tero denove fekunda, kaj de Vivoplenaj Semoj.

Jen la rakonto de la etno botanikisto John Kimney, gastigita de David Monongye, religia estro kaj saĝulo de la Hopi-tribo:

Dum julio, pluraj jaroj antaŭe, mi estis invitata dum kvar semajnoj en Third-Mesa, en la Hopi-lando. Jam de tri semajnoj ne pluvigis, kaj la grundoj sekiĝis pro la influo de la varmegoj. Estis tagmeze, kaj mia gastiganto, en la

freŝeco de sia ŝtona domo, kviete duonendormiĝis. Ne eblis al mi resti senmove. Mi malforte fermis la moskitvualan pordon post mi, kaj mi enpro fondiĝis en la varmecon de la kisnovi, la vilaĝa placo. Mi elrigardis por malkovri iun movon, sed ĉio estis tiel kvieta, kiel estis noktomeze. Nur hundo moviĝis por ne perdi iom da tagmeza ombro. Ŝajne, la cetero de la vilaĝo respektis la ritaron de la profunda siesto, kiun Tawa (taŭa), la Patro-Suno, trudis ĉiutage al ili. "Nur la frenezaj hundoj kaj la Angloj je la tagmeza suno", mi murmuris, revemtone. Mi eĉ ne sciis, kien mi iras, malsuprenirante laŭ la bordo de la mesa (altebenaĵo) sur pado, kiu estis, jam delonge, kvazaŭ pikpikita en la molaj rokoj, dum pli freŝaj tagoj.

Kiam mi atingis la klifan malsupron, mi vidis lacerton, kiu haste enŝoviĝis sur polvoza vojeto. Tiam, mi sekvis ĝin, kvazaŭ tiu kreitaĵo gvidus min. Post proksimume kvaronhora marŝado, la pado aliris subite norden, ĉirkaŭ amaso da disfalaĵoj. Antaŭ ol mi kapablas vidi aliflanke de la rokoj, mi aŭdis malfortan kantantan voĉon. Mi malrapidigis mian paŝadon, kaj provis rigardi. Antaŭ mi troviĝis vastaĵo de maizo, la plej vasta, kiun mi iam povus admiri en tiu regiono. Ĝi estis tiel granda, ke ĝi ne ŝajnas povi esti Hopi. Mi ankoraŭ ne vidis iun, sed la kanto fariĝis pli klara. Mi divenis, ke temas pri la dolĉa kaj laŭtega voĉo de maljunulo. Sed kie li estis? Mi atendis ankoraŭ kelkajn minutojn, aŭskultante tiun kantantan kampon de maizo. Kaj subite, el la verdaj maizaj tufoj blanka kapo aperis, kiu, laŭflue de la vicoj, malrapide moviĝis senĉese kantante.

Mi ekkonsciiĝis subite pri tio, kion miaj okuloj vidis. Tiu kampo de maizo, plene de la somero, estis belega kaj superabunda. Ĉirkaŭ



dekduo da spikoj maturiĝis en ĉiu tufo, kaj rapida taksado indikis al mi, ke tie troviĝas verŝajne 1 200 tufoj de maizaj plantoj. La grundo estis seka kaj pergamenece sekve de longdaŭraj periodoj de sekeco, kaj tamen, la maizo apenaŭ montris velkitajn signojn, male de la aliaj kampoj, kiujn mi estis observinta ĉirkaŭe de la vilaĝo. La plendoj, kiujn mi aŭdis de la farmistoj, kiuj vivis apud la domo, kie mi loĝis, pripensis min, ke la tuta maizo malfortiĝis pro manko de akvo. Tamen, ŝajnis al mi, ke tiu kampo ĵus ricevis benitan pluvon! Mi kviete denove supreniris la vojnon kondukantan al la vilaĝo, nevidate de la maljunulo. Mia gasto estis nedormanta, kaj demandis de kie:ri mi revenis. Kiam mi klarigis alii, kion mi vidis kaj aŭdis, la intereso, kiun li montris rilate miajn vagadojn, transformiĝis en amuzatan rideton.



- Mi konstatas, ke vi trovis la kampon de Tituso, li diris, eligante dampitan rideton.
- Sed kial tiu kampo estas tiel splenda? Ĉu ĝi posedas sekretan akvofonton? Avo nur ridis.
- Kompreneble ne. Sed ĝi entenas Navoti.
- Kio estas tio? mi demandis, opiniante ke eble ekzistas sekreta fekundilo atingebla nur de kelkaj klanoj.

- Li posedas la Hopi-vojon, klarigis al mi A vo, post pensema paŭzo. Li konas la malnovajn kantojn, kiuj freŝigas siajn maizo-infanojn. Li senerare recitas siajn preĝojn dum la semado. Kaj, kio plej gravas ol ĉio, li scias, ke ne necesas maltrankviliĝi, ĉar anksio malutilas al plantoj same kiel sekeco. Prefere ol angori, kio nervozigus siajn infanojn, li iras al ili en la varmece de la tago, kaj li kantas al ili la malnovajn kantojn, kiuj estas por liaj infanoj, fonto de kuraĝo. - Sed, Avo, la aliaj homoj certe rimarkis la diferencojn de lia maizo. Kial ili ne lernas liajn kantojn, kaj kial ili ne kantas por sia maizo? Mia maljuna mastro Hopi suspiris.
- Tio ne utilas. Navoti ne plu vivas en la semoj de la aliuloj.

Fine de tiu grava monato pasigita sur la mesa, mi veturis aŭtomobile al la nordo, laŭirante la valon de Rio Grande, por atingi Taos, la urbon, en kiu mi loĝis. Dum mi traveturis ĉiun el la dek naŭ pueblon (vilaĝoj), mi travivis kvazaŭ alvokon. Mi konstatis, eble unuafoje, kiel malmulte la malnovaj kulturoj estis uzataj, eĉ la luzemo. Ŝajnis al mi, ke la semoj vokis min. Mi ekkonsciis, ke la fonto de la povo, kiun mi spertis, estas enkapitata en la semŝirmejoj, en la argilpotoj, en la kafskatoloj kaj en la siteloj ordigitaj en la mallumaj anguloj; ĝi troviĝis ankaŭ en la malnovaj tapiŝoj el plektitaj maizoj.



La grajnoj, kiuj vokis min, estis malnovaj grajnoj, rikoltitaj antaŭ la estiĝo de la supermarktoj, antaŭ la uzado de la saketoj el aluminio, kiujn oni trovas sur la bretaro de la butikoj, komence de ĉiu printempo. Ili estis la grajnoj pri kiuj Avo rakontis al mi, tiuj, kiuj ankoraŭ posedas la Navoti de la pasintaj aĝoj. Ĉirkaŭ kvindek jarojn poste, ilia vivo forto estas sendifekta. La seka klimato de la altaj ebenaĵoj favorigis la konser vadon de iama povo, kiu vivis en la epoko, kiam la homoj kantis por siaj plantoj. Al mi tiuj semoj direktis nun siajn kantojn, hm la espero esti aŭdataj antaŭ ol malaperi definitive en la forgeson.



- Eltiraĵo de la verko publikigita far Seed Savers Exchange: "The first ten years" - 1986.
- Franca traduko de Dominique GUILLET.
- Esperantigita fare de la grupo de Valenciennes, kun la helpo de S-ino Jackie Huberdeau el la grupo de Le Mans (Francio), laŭ la propono de Mo (Belgio).

66

La franca asocio Kokopelli, turnonde aktiva, protektas la biodiversecon. Ĝi vendas kaj donas grajnojn de malnovaj specoj.

### Por pliaj informoj:

- en Francio :

Oasis  
131 impasse des Palmiers  
30100 Alès

☎ 04 66 30 64 91  
aŭ 04 66 30 00 55

[www.kokopelli.asso.fr](http://www.kokopelli.asso.fr)

- en Belgio :

Terre potagère - Semences de Kokopelli

Isabelle et Roland Devaux

1 rue Fontena  
5374 Maffe

☎ 086 32 31 72

[www.kokopelli-be.com](http://www.kokopelli-be.com)





## **Kvar vizioj : Kiel vivi en la ruiniĝanta Esperantio ?**

### **Kvar vizioj :**

La kvar voĉojn pri la nuntempa stato de Esperanto, kiuj aperis en *La Ondo*, ne ligas senpera diskuto inter la aŭtoroj, kiuj estas esperantistoj kun signifaj pozicioj en Esperanto: Grigorij Arosev – prezidanto de Rusia Esperantista Unio (REU), Giorgio Silfer – Konsulo de la Esperanta Civito, Trevor Steele – verkisto kaj instruisto, José Antonio Vergara – eksestrarano de UEA. Formo de intervjuo aperas nur kaze de Silfer, la aliaj voĉoj aperas forme de senpera elparolo kiel propraj artikoloj de la aŭtoroj.

### **Kvar motivoj**

Ĉiu el la kvar aŭtoroj specife vidas interrilaton inter la ekstera nuntempa mondo kaj la mondo de Esperanto (kaze de Silfer la ekstera mondo komenciĝas ekster la raŭmista Civito kaj finvenkistoj kunkreas ĝin). Oni povas esprimi la bazajn alirojn kiel kvar motivojn.

**Esperanto iĝas nebezonata.** – Grigorij Arosev opinias, ke al la mondaj problemoj apartenas ankaŭ la malaltiĝo de la valoro de Esperanto kiel internacia komunikilo. Tio okazas ĉe domino de la angla kaj fulma evoluo de teknologioj. Rezulte, angle oni sufiĉe bone interkomunikiĝas baze, ekzemple, en turismo, sen apliko de Esperanto. Ĝi iĝas nebezonata.

**Esperanto valoras nur kiel raŭmismo.** – Laŭ Giorgio Silfer, Esperantion kreas la Nova Esperantio – Civito (raŭmistoj) kaj la Malnova Esperantio (finvenkistoj). La mondo de finvenkistoj estas en krizo: UEA en krizo de identeco, kaj SAT en agonio. La

ĉefa problemoj de la tuta Esperanto-medio: nesufiĉa empatio kaj sinergio en interhomaj rilatoj koncernas ankaŭ Civiton. Tamen inter finvenkistoj ĝi estas multe pli rapida kaj granda. La Malnova Esperantio mortas.

**Esperanto – pli ol lingvo – regresas.** – Trevor Steele, komparante la unuan Esperanto-kongreson en Aŭstralio kaj la jubilean kongreson post cent jaroj, konkludas, ke la mondo ankoraŭ ne estas sufiĉe matura por adopti Esperanton, kiu estas ne nur lingvo, sed ankaŭ internacia pensmaniero. Esperantistoj sin prezentas kiel mikroskopa parteto de la monda loĝantaro. En la alekstera Esperanto-agado okazas regreso, ne progreso.

**Nek finvenkismo, nek raŭmismo – Esperanto kiel plivastismo.** – José Vergara esprimas konvinkon, ke ĉefe porimperisma lingvopolitiko kaj la tutmonda merkatingo igis la anglan reganta kaj “forprenis” kampojn espere ligatajn antaŭe kun Esperanto (scienco, komerco, turismo). La ideologio de radikalaj finvenkistoj gvidas Esperanton al neegala batalo kun la angla, kiel Davido kaj Goljato. Samtempe la ideologio de raŭmistoj ŝajnas skolastike memcentrita en la supozata unikeco de iu “Esperanta kulturo”. Eblas la tria vojo – plivastismo.

### **Esperanto kaj esperantistoj: margenaj kaj ekskluditaj**

La bildo de Esperanto kaj esperantistoj, kiun prezentas la motivoj, enhavas: malaltiĝon de la valoro de la lingvo kiel internacia komunikilo, eĉ ĝian nebezonon kompare kun la reganta angla, kiu “forprenis” la lokojn iam rezervitajn por Esperanto; krizon de UEA kaj agonion de SAT; ne sufiĉe homajn interhomajn rilatojn de esperantistoj; la mondon nepretan akcepti Esperanton, kiun uzas nur

manpleneto da homoj sur la planedo; fiaskon de ideotendencoj – de raŭmismo kaj finvenkismo. Tia estas la bildo de la ruiniĝanta Esperantio.

Esperantio mem situas kiel margena kaj ekskludita kompare kun la ĉefaj sferoj de socia vivo. Atestas tion karakterizoj de la loko de Esperanto. La aŭtoroj vidas ĝin ĉefe kiel perdatan, aŭ perditan, se temas pri internaciaj komunikiloj (Arosev); lokon inter lingvoj kun malalta societa prestiĝo (Steele); lokon en unu el strangaj grupoj el socia panoptiko (Vergara); lokon en kulturflugema oazo libera de ruiniĝantaj rilatoj kaj agoj de kredantaj finan venkon (Silfer). Rigardante tiun bildon ni povas supozi, ke ĝi devas elvoki demandojn pri demarĝenigo kaj inkludo de Esperanto kaj esperantistoj. Kvankam al praktika socia vivo apartenas fenomeno de homoj kaj socigrupoj, kiuj adaptiĝis al sia margena socia pozicio.

### **Roloj: inter ĥimera etoso kaj kulturlingvo**

Se ni prezentus kontinuon pri roloj de Esperanto (de primaraj al sekundaraj), karakterizitaj far la aŭtoroj, tiam roloj koncentriĝus je fino signita per roloj sekundaraj. Temas pri reduktiĝo de la lingvo al lingvistika interesiĝo kaj absolute ĥimera Esperanta etoso (Arosev), aŭ pri senperspektiva hobbio, kvankam Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ internacia pensmaniero (Steele), aŭ pri rolo de malamiko de la angla (Vergara). Ĉe alia fino de la kontinuo konserviĝas komunika rolo de “transnacia kulturlingvo” kiel baza rolo de Esperanto (Silfer).

### **Kion fari?**

Laŭ Arosev, esperantistoj, por ne postresti, devos sekvi aktualajn tendencojn kaj “montri ekzemplon” de moderneco, ĉefe

lige kun la ret-uzado, ekzemple, “enretigi” servojn, aktivi en sociaj retoj, enkonduki retan voĉdonadon ktp.

Baze de la raŭmisma vidpunkto de Silfer, raŭmismo mem estas la recepto por agi en la Malnova Esperantio, kio signifas i.a. kreadon de la Nova Maldekstro en Esperantio, la Novan Esperantion – Civiton kiel konsorcion kun paktintoj, federismon, ĉar eblas alternativa maniero organizi Esperantion.

Steele opinias, ke, kvankam ne multo dependas de esperantistoj, ili povas kalkuli, ke potenĉavaj neesperantistoj fine komprenos la valoron de la Zamenhofa donaco al la mondo. Des pli, ke la ideo de Esperanto, laŭ Piron, estas tiom bona, ke iam ĝi devos venki. Esperantistoj tamen devas atendi aktive, agante: (1) Ili daŭrigu la propagandon, malgraŭ la limigitaj rimedoj, ke Esperanto restu parto de la monda kultura pejzaĝo. Necesas vivteni la lingvon kaj la idealon; necesas evoluigi la lingvon, ke ĝi estu preta por servi en ia ajn situacio, ia ajn fako. (2) Ili prilaboru terminarojn por ĉiu vivkampoj: scienco, filozofio, komerco, religio, politiko, ktp, ke oni povu tuj uzi ĝin. (3) Kaj ili neniam forgesu la idean flankon: Esperanto estas pli ol lingvo.

Laŭ Vergara, nek finvenkismo, nek raŭmismo, sed “plivastismo” – la reale ekzistanta sinteno kiun li rekonas ĉe multaj esperantistoj (kiel li mem). Temas pri homoj kiuj amas Esperanton, travivas ĝin kiel gravan eron de sia vivo, opinias ĝin valorega praktika ilo de tuthomara, tergloba konscio sur/per la plej homa trajto (la lingvo), kaj eventuale provas diversmaniere kontribui al ĝiaj prestiĝo, videbligo kaj pluvivigo. Gravas plivastigi “plivastismon”.



Malgraŭ la bildo de la ruiniĝanta Esperantio la aŭtoroj ne konkludas malvenkon. Male, ili proponas manierojn pluvivi en ĝi.

### **Danĝera vivo en Esperantio**

La vivo tie proponata far aŭtoroj sin prezentas danĝera. Iliaj trankviligaj respondoj ne estas tro konvinkaj. Kvankam la impreso pri la ruiniĝo malfortiĝas, se konsideri ne nur la disfalon, krizon, malaperon de multaj tradiciaj formoj de la Esperanto-vivo, sed ankaŭ aperon de formoj novaj, evoluon de nuntempaj.

Danĝeron elvokas jam iluzia rekono de kaŭzoj de detruo, malgraŭ la plej ofte veraj priskriboj de ĝia manifestiĝo. Tio vidiĝas kaze de “manko de bezonoj”, per kiu Arosev klarigas kaj la plimalvalorigon de Esperanto kiel internacia komunikilo, kaj la malaktivecon de esperantistoj. La merkata procezo, pri kiu li mencias karakterizante vendomarkon, okazanta ankaŭ en Ruslando, estas la esenca kaŭzo de “manko de bezonoj” pri Esperanto, sekve ankaŭ de sintenoj de esperantistoj, el kiuj “neniu bezonas ion ajn” (ekzemple, centran retan informojon, aŭ novan retejon de REU). La merkatan valoron de Esperanto oni ne povas serioze kompari kun la valoro de la angla. Samtempe la merkatingado de socio havas sian esprimon en Esperantio. En socio, en kiu ĉio iĝas varo, ĉio estas por vendi, vole nevole gravas ne nur senti/havi bezonon, sed ankaŭ havi ilojn (monon) por realigi ĝin (en ekonomio tio nomiĝas efektiva bezono). Do “manko de bezonoj”, i. a. de esperantistoj devas esti analizata laŭ tio, kiomgrade temas pri manko de efektiva bezono (ekzemple, nepartopreno en Esperanto-kongresoj pro manko de mono).

Danĝera estas (mi dirus: en si mem kaj por si mem) la Nova Esperantio laŭ vizio de

Silfer. Ne nur pro la raŭma narcisismo (kiun alivorte rimarkas Vergara) kaj eĉ ne pro uzado de distingo, kiu favoras dividi esperantistojn. Temas pri baza dependo de ekzisto de la raŭma Civito de la Malnova Esperantio (de kie devenas membroj de Civito, nun proklamita kiel la Nova Esperantio). La “malnova Esperanto-mondo” ruiniĝas, kaj laŭ tiu vizio falo de la Malnova Esperantio elvokos inundon, kiu subakvigos Civiton. La aŭtoro ŝajne ne konscias pri tiu konsekvenco. Li bonintence invitas tiujn, kiuj fine “subite ekvidis”, al *Titanic* – al Civito, kiu kiel formo de ŝtato (kvazaŭ Neŭtrala Moresneto) estas kontraŭdiro de la Zamenhofa vizio de Esperanto. Bela vojo iĝas “blinda” – fina vojo.

Male al la raŭma Esperantio, la Esperantio de Steele allogas pro la kruela vero pri la mondscale marĝena esperantistaro, kiu mem neniam kaŭzos “triumfon de Esperanto”, kaj tasko aktive agi malgraŭ tio. Ĉar la triumfo eblas, sed dependas de potenĉavaj neesperantistoj. Oni rimarkas, ke la danĝero dormas en praktika realigado de tiu sinteno. Kiam senpacieneco dominas, ĉar la atendado ŝajnas tro longa, inter esperantistoj formiĝas emo pli kaj pli forte influi potenĉavulojn eĉ koste de rezigno je la interna agado, ekzemple, de tiu postulata de Steele. Montris tiun ekstreman aliron la tiel nomata “pola konflikto”. Kiel mi sugestis (*La Ondo de Esperanto*, 2010, №12), la konflikto de atendoj je la triumfo de Esperanto estas produkto de la Esperanto-movado kaj rilatas al la du ĉefaj tendencoj. La unua baziĝas sur senĉesa popularigado kaj instruado de Esperanto (influoj de Zamenhof, Lanti k. a.). La dua rilatas al la konvinko, ke Esperanto iĝos akceptata mondscale, aŭ pli malgrandscale per decido politika de gravaj ŝtataj institucioj, internaciaj organizaĵoj (influoj

de Hodler, Privat k. a.). Ĉe la unua kazo plej gravas desuba aktivado de esperantistoj, kiuj mem kreas bezonon instigante aliajn. Ĉe la dua sufiĉas desupra aktivado de Esperanto-elito kaj politika decido enkonduki Esperanton, kiu kreas oferton. Utile estas nomi tiujn ĉi du tendencojn: desubisma kaj desuprisma. Kaze de la desuprisma sinteno povas aperi sakstrato: potenĉavaj neesperantistoj iĝas tro malfortaj por la decido kaj esperantistoj-desupristoj pro rezigno agi interne konfliktiĝas kun la agantaj tiuforme kaj aldone plimalfortigas la sufiĉe malfortan esperantistaron.

Esperantio de Vergara baziĝas je psika sinteno nomata plivastismo. Ĝi elkreskis el kritiko kaj forĵeto de raŭmismo kaj finvenkismo. El tiu ĉi fakto devenas kaj forteco kaj danĝera malforteco de plivastismo. La du kontraŭdiraj tendencoj, kiel ĝuste substrekas Vergara, plenumis sian rolon. Li opinias, ke temas pri “false dupolusa Esperanto-ideologia kampo”. Estas interese, ke la aŭtoro de la kvara vizio memstare sekvas la vojon montritan en la Proklamo de Voss (1991) kaj Proklamo pri elĉerpiĝo de la paradigmo finvenkismo-raŭmismo (Poznań, 2003). Ambaŭ dokumentoj substrekas, ke ekzistas pluraj movadaj tendencoj, kaj nek raŭmismo nek finvenkismo estas la plej fundamentaj. El studoj pri la movado devenas kelkaj klasifikoj. La bazaj ideo-tendencoj devenas, laŭ mi, de diferenco, substrekita de Jerzy Leyk, inter pure komunika aliro al la rolo kaj funkcio de Esperanto, kiu meritas vastan eklernon kaj rekonon pro la komunikaj valoroj (ekzemple, la grupo de Beaufront), kaj kulturporta kaj socipretenda aliro al la rolo kaj funkcio de Esperanto, kiu proksimigas popolojn kaj esence ŝanĝos sociajn rilatojn (Zamenhof-Hodler-Privat). Alivorte, temas pri elitisma kaj popola

tendencoj. Plivastismo estas danĝera, ĉar ĝi malfortas pro la sterila karaktero de “siaj gepatroj”: finvenkismo-raŭmismo, de kies kritiko ĝi aperas, kaj pro sia psika karaktero, grava, sed ne bone servanta al objektiva analizo. Praktike, ĉeestanta en la movado de ĝia naskiĝo.

La komparo paradokse atestas, ke la bildo de la ruiniĝanta Esperantio, kvankam ne ĉiupunkte vera, elvokas principe emon batali eĉ kaze de la marĝena rolo de la lingvo kaj la movado.

Malkovriĝis ankaŭ pensmanieroj, kiuj ne servas al la vera bildo pri ili. Al tiuj ĉi pensmanieroj apartenas la neado de la socie marĝena kaj ekskludita pozicio de Esperanto kaj esperantismo. La prezentitaj vizioj priskribas, kiel, konsciante pri limigoj kaj danĝeroj, oni povas vivi kiel esperantisto en la nuntempaj cirkonstancoj.



**Zbigniew Galor**

Legu ankaŭ la pritraktitajn artikolojn:

Grigorij Arosev :

<http://sezonoj.ru/2011/09/arosev/>

Giorgio Silfer :

<http://sezonoj.ru/2011/10/silfer/>

Trevor Steele:

<http://sezonoj.ru/2011/10/steele/>

José Antonio Vergara:

<http://sezonoj.ru/2011/11/vergara/>

Ĉi tiu artikolo aperis en la aprila kajero de *La Ondo de Esperanto*, 2012, № 4.





## Familiaj ĝardenoj

La laboristaj ĝardenoj kiuj aperis je la fino de la 19-a jarcento, estas parceloj de tero kiujn urbestroj disponigis al la loĝantoj. Tiuj parceloj plej ofte servis por la kultivado de legomoj, kaj ili estis unue destinitaj por la pliboniĝo de la vivokondiĉoj de la laboristoj, ĉar tiuj ĝardenoj havigis al ili socian ekvilibron kaj nutran memrimedon. Post la dua mondmilito la laboristaj ĝardenoj estis nomitaj familiaj ĝardenoj.



Dum la napoleonaj militoj, oni ekparolis en Anglio pri « allotments » t.e. terenoj atribuitaj al la laboristoj. Laŭ iuj, necesis 2000 kvadratmetroj kaj laŭ aliaj nur la duono. Sed ĉiu konsentis la grava rolo de la ĝardenoj.



En Germanio, ekde la dua duono de la 19-a jarcento, la kuracisto



kaj pedagogo Daniel Gottlob Moritz Schreber ekdisvolvis la ideon pri laboristaj ĝardenoj laŭ la pensfadeno de siaj laboroj pri la publika sano. La ideo estis ebligi por la laboristoj distriĝon unuflanke per la ĝardenumo kaj aliflanke per la ĝuado de sana ripoziga medio. Krome la kultivado de fruktoj kaj legomoj por rekta konsumo povas plibonigi la nutraĵon de la laboristoj.



Tamen post lia morto pasis tri jaroj, kiam en 1864 lia bofilo Ernst Innozenz Hauschild fondis apud Lepsiko lud-placeton por la malfavoritaj infanoj. Omaĝe al sia bopatro, li nomis ĝin Schreber-placo. Rapide la gepatroj siavice ekposedis la spacon kaj komencis kultivi plantojn. Sub la nomo Schrebergarten ( t. e. laŭvorte ĝardeno de Schreber) la laboristaj ĝardenoj tiam disvolviĝis en tutan Germanion kaj aparte en la industriajn

regionojn kiel Ruhr-regiono, tipa mina regiono. Tiuj ĝardenoj ofte estis kolektive prizorgataj de la laboristoj, kaj tiel formis malgrandajn komunaĵojn kiuj nutris la socian ligan.



Hodiaŭ la Schrebergarten estas en Germanio vera institucio kun striktaj reguloj (alteco de la heĝoj, surfaco de la kabanoj kaj de kultivataj spacoj), konkuroj pri plej bela Schrebergarten kaj ĝiaj reguloj pri la atribulado.

En Francio pruntedonite aŭ transdonite, la tereno ligis la laboriston al lia fabriko kaj tenis lin malproksime de la trinkejo. Eĉ se ili havis paternalisman karakteron, la laboristaj ĝardenoj estis allogaj, ĉar ili kongruis kun reala bezono. La unuaj francaj laboristaj ĝardenoj estis inspiritaj de la legomĝardenoj laŭ la modelo en Germanio. La ideo de Schreber pri laboristaj ĝardenoj por « eduki la laboristaron kaj plibonigi la publikan sanon » estis adoptita de kelkaj homoj, kiel la

pastro Volpette en Saint-Etienne kaj sinjorino Hervieu en Sedan.



Je la fino de la 19-a jarcento la pastro Jules Lemire kiu estis influa politika homo kaj kristana deputito-urbestro de la nord-franca urbo Hazebrouck celis per la laboristaj ĝardenoj plibonigi la situacion de la laboristaj familioj.

"La laboristaj ĝardenoj havas socian destinon kaj defendas iun socian ordemon: se ili ebligas, ke la laboristoj eliras el siaj loĝejaĉoj kaj ĝuas pli spireblan aeron, la ĝardenoj ankaŭ forigas ilin de la trinkejoj kaj subtenas la familiajn agadojn meze de tiuj verdaj spacoj". La pastro Lemire fondis la "Francan Ligan de la terpeco kaj de la hejmo" en 1896, kun la celo simpligi por siaj administratoj atingi la parcelojn."

En 1996 por festi la 100-an datrevenon de la laboristaj ĝardenoj estis kreita rozo « Abbé Lemire », kiu estas admirebla en la ĝardeno de la Palaco Elizeo kaj en la botanika ĝardeno de Monaco.

## MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO (25.2. - 3.3.2012)



Jam la 6-an fojon okazis en Francio ĉe la Mediteranea maro la Esperanto-Semajno. Organizas ĝin Monique Prezioso kaj Christine Graissaguel el la E-grupo de la urbo “Saint Raphaël”. Antaŭajn jarojn ĝi okazis en la urbo “Agay” kaj ĉi-jare oni elektis la rezidejon de “Vacanciel” ĉe la marbordo de “Les Issambres”. Ĝi troviĝas inter la urboj “Fréjus” kaj “Saint Tropez”. La eventon partoprenis ĉirkaŭ cent geesperantistoj, precipe francoj, sed venis gastoj el aliaj eŭropaj landoj: Belgio, Ĉeĥio, Finnlando, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Svedio kaj Svislando. La aranĝo okazis en luksa apudmara hotelo, kie en la pasinteco feris miliardoj. Post ilia foriro ĝi estis transformita en libertempan restadejon kun bele aranĝita parko. Al ĝi ankaŭ apartenas kelkaj komfortaj dometoj situantaj sur monteto. En apuda konstruaĵo okazis ĉiuj aktivaĵoj de la Semajno. Matene kaj vespere, antaŭ la manĝoj, okazis E-kursoj de diversaj niveloj. Ni povis pliprofundigi niajn sciojn pri la historio, perfektigi la E-lingvon kaj ĉefe la gramatikon. Instruis Perla Miele el Hungario, Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar el Germanio, Pascal Vilain kun sia edzino **Mari-Roza** kaj **Daniel Moirand** el

Francio. Bone funkciis ankaŭ la libroservo. La posttagmezoj estis liberaj kaj ĉiu povis elekti sian aktivaĵon. La bela naturo kun florantaj kaj bonodorantaj mimozfloroj logis al montaraj aŭ ĉemaraj promenoj. Pluraj el ni vizitis pli malproksiman ĉirkaŭaĵon peraŭte aŭ buse. Merkrede posttagmeze ni ŝipveturis al la famkonata (pro la filmoj pri Ĝendarmoj) apudmara somerrestadejo “Saint Tropez”. De la maro ni vidis luksajn domojn kaj vilaojn de konataj francaj aktoroj, artistoj, kantistoj kaj de aliaj milionuloj. Post agrabla promonado en la pitoreska urbo ni revenis al “Les Issambres”.

Vespere ni povis ĝui programerojn de la hotelo (kabaredo, kantado, maskobalo...) kaj ankaŭ la niajn. Peter kaj Zsófia prezentis al ni la Esperanto-urbon “Herzberg” en Germanio kie ili vivas kaj aktivis. Ili invitis la ĉeestantojn al la fervojista kongreso, kiu okazos tie en majo. La geedza paro Hubert kaj Michèle el Belgio prezentis siajn E-aktivaĵojn dum la jaro 2011, Saliko el Finnlando parolis pri sia lando kaj ties kutimoj. Jean-François Cousineau el Francio prezentis unikan filmon pri sia vojaĝo al Sumatro kaj ties aventuroj. La lasta vendreda vespero estis dediĉita al prezentoj de la partoprenantoj. Ni aŭdis kantojn, poemojn, skeĉojn, humuraĵojn kaj fine oni ankaŭ invitis al dancado en akompano de akordionoj. La etoso estis gaja kaj agrabla. Sabate matene okazis lastaj kursoj kaj post la tagmanĝo ĉiuj disiĝis al siaj hejmoj. Ni ĝuis agrablan semajnon en bela regiono de suda Francio, kie abundis florantaj mimozoj.

*Liba Gabalda*





25.2. - 3.3.2012



Ĉeĥinoj prezentas sin

# Mediteranea Esperanto-Semajno



## Les Issambres



Peter



Zsófia



Perla




Daniel



Pascal



Informoj pri Herzberg



Saint Tropez



Sumatro



Distra vespero











Esperanto-Kafejo : Ĝoja etoso !